Informilo de Baltiaj Esperanto-Tagoj 56 en Klaipėda, Litovio

# LUMTURO

Redakcia retadreso: chojus@gmail.com
http://www.esperanto.lt/board/zboard.php?id=BET56

**N-RO 3** | 2022 07 11, lundo

## Salutmesaĝoj

**Prof. d-ro Artūras Razbadauskas,**
**rektoro de la universitato**



**Karaj partoprenantoj de la Baltiaj Esperanto-Tagoj,**

Estu salutataj en la Klajpeda Universitato, en la haveno de scienco kaj scioj ĉe la Litovia marbordo. Ni malfermas la pordojn de niaj aŭditorioj, por ke ilin plenigu bruo de partoprenantoj de la 56-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj, por ke ĉi tie sonu la unika lingvo Esperanto, unuiganta ŝtatojn, popolojn kaj homojn.

Historio kaj komunumo de la internacia Esperanto-movado, ĝiaj eminentuloj, ankaŭ faritaj laboroj dum pli ol jarcento tre impresas. Por ni, reprezentantoj de la akademia mondo, estas inde ekkoni la historion de la lingvo Esperanto kaj lerni de ĝiaj iniciatintoj sinceran kredon je sia ideo, ankaŭ celkonscian agadon, disvastigante la inventon, kiu unuigas la mondon.

Restu aranĝoj destinitaj al la glora 135-a datreveno de la lingvo Esperanto en la Klajpeda Universitato ne nur formala enskribo en nia kaj via historioj, sed ankaŭ instigo al la urba klera socio lerni Esperanton kaj helpe de ĝi ekkoni la mondon.

Estime,

**Prof. d-ro Artūras Razbadauskas,**
**rektoro de la universitato**

## Programo

**La 12-an de julio (mardo)**

09.00–10.30: Matenmanĝo (en la konstruaĵo n-ro 11)
11.00–12.00: Prelego de prof. Ilona Koutny "La obstinaj radikoj" (1K)
11.00–12.00: Prelego de prof. Amri Wandel pri spacteleskopoj (2K)
11.00–12.00: Mikaelo Bronŝtejn prezentas sian novan romanon Simeono (salono de la konstruaĵo n-ro 1 per Zoom-programo)
11.00–13.00: Ĉiunivelaj Esperanto-kursoj (aŭditorioj 119, 216, 314, 315 en kontruaĵo n-ro 5)
12.00–13.00: Prelego de Aida ČIŽIKAITĖ pri la litovaj lingvo, kulturo, historio (1K)
12.00–13.00: Prelego de prof. Duncan Charters "Interkultura kompetento – kio ĝi estas kaj kion ĝi celas?" (2K)
13.00–14.30: Tagmanĝo
15.00–16.00: Prelego de d-ro Gediminas Degėsys pri Nigra Afriko (1K)
15.00–16.00: UEA hodiaŭ: demandoj kaj respondoj. Prof. Duncan Charters kaj prof. Amri Wandel (2K)
16.00–17.00: Prelego de Tuomo Grundström pri la verkistino Aino Julia Maria Kallas (1K)
16.00–17.00: Prelego de Ulrich Brandenburg "Esperanto kaj daŭripovo: spertoj de la 99a Germana Esperanto-Kongreso" (2K)
17.30–18.30: Vespermanĝo (memstare)
19.00–20.30: Koncerto de Anjo Amika "Bela Revo" (Aŭlo en la kontruaĵo n-ro 6)
20.30–22.00: Koncerto de Georgo Handzlik "Bardo sen barbo" (Aŭlo en la kontruaĵo n-ro 6)

**Ŝanĝo de la programo**!!!

Ekde mardo ĝis la fino de BET prelegos Aida ČIŽIKAITĖ ekde la 12a horo kaj Ilona Koutny ekde la 11a horo en la sama aŭditorio 1K. Ĵaŭde anstataŭ Aida ČIŽIKAITĖ prelegos Gražina Opulskienė pri "Litovio antaŭ kaj post 1990".

## Salutmesaĝo

**Povilas Jegorovas,**
**Prezidanto de Litova Esperanto-Asocio**



Bonvenon al nia tradicia esperantista aranĝo, kiu ĉi-jare estas dediĉata al la 135-jariĝo de Esperanto kaj al la 770-jariĝo de Klaipėda – urbo, kie ni kuvenas! Baltiaj Esperanto-Tagoj estas unika fenomeno en la internacia Esperanto-movado funkcianta jam dum pli ol 60 jaroj. Aperinte en 1959 dank' al iniciato de tiutempaj junaj esperantistoj-studentoj kiel modesta renkontiĝo, ĝi tuj evoluis al amasa kaj tiutempe preskaŭ sola esperantista aranĝo en tuta tiutempa Sovetunio kaj post sendependiĝo de Baltiaj landoj ĝi ne nur konservis sian tradicion, sed laŭ geografio de la partoprenantoj etendiĝis tra tuta Eŭropo kaj eĉ pli foren. BET kiel historia fenomeno eltenis influon de la tempo kaj de esencaj politikaj kaj ekonomiaj ŝanĝoj, ĉar ĝi en si mem havas iaspecan internan forton altirantan multajn homojn kaj post esenca internaciiĝo ĝi ekhavis multajn novajn kolorojn kaj aspektojn.

Ĉi-jara BET okazas post du-jara deviga pandemia paŭzo, kaj tio ankaŭ nun forte influis al kvanto de partoprenantoj – ĝi estas pli malgranda ol kutime. Ankaŭ subita milito en Ukrainio malhelpis al multaj veni al Litovio... Tamen nuna BET elstaras pro tre riĉa, interesa, diversflanka, streĉa kaj intensa programo, en kiu ĉiu povas trovi ion interesan por si.

Ĉi-jare ni renkontiĝas en Klaipėda – apudmara regiono de Litovio, kie Esperanto kaj bela ideo de interpopola kunlaboro kaj amikeco ne estas fremda.

Litovio nur antaŭ iom pli ol 30 jaroj revenis al la politika mondmapo de egalrajtaj nacioj kaj ŝtatoj. Tamen Litovio havas longan historian, antikvan lingvon, unikan kulturon, belegan naturon. Mi esperas, ke partoprenantoj de BET-56 ĉion tion ekvidos kaj ekspertos senpere kaj revenos hejmen pli riĉaj kulture kaj spirite.

Bonvenon al Litovio! Bonvenon al Klaipėda! Belegajn, interesajn kaj utilajn tagojn!

## Kultura programo de BET-56

Kiel kutime, ankaŭ la kultura programo de BET-56 estas tre riĉa. Jen estas planataj programeroj.
**Por la ĝustaj dato kaj loko de la koncerna programero bv. legi numerojn de LUMTURO**.

1. **Anjo Amika** estas konata hungara kantistino kaj koncertas "Bela Revo".

2. **István Ertl** gvidas atelieron. Interesatoj ekzerciĝas pri tradukado proza kaj poezia el diversaj lingvoj al Esperanto kaj pridiskuti la rezultojn.

3. **Tuomo Grundström** prezentas du elstarajn verkistinojn trans la Finna Golfo, estoninon finniĝintan kaj finninon trovintan hejmon kaj krean temaron en Estonio.

4. **Georgo Handzlik** koncertas "Bardo sen barbo".

5. **Mikaelo Lineckij** instruas kantojn el la SEJMa epoko.

6. **Mikaelo Bronŝtejn** prelegas kaj koncertas ne per fizika ĉeesto, sed per virtuala Zoom-programo.

7. **Saŝa Pilipović** aktoros kaj kantos. Li estas la konata serba teatra, filma kaj televida aktoro.

8. **Sepa kaj Asorti**, konata esperantista muzika grupo, koncertas.



Kredeble, vi jam sufiĉe orientiĝas en la tereno de la Klajpeda Universitato. Vesperaj kulturaj programeroj de BET-56 okazas en la unua etaĝo de la supra konstruaĵo n-ro 6.

## Kleriga kaj eduka programo de BET-56

En 56-a BET okazos klerigaj kaj edukaj programoj. Jen kelkaj prelegantoj kaj temoj de iliaj prelegoj.
**Por la ĝustaj dato kaj loko de la koncerna programero bv. legi numerojn de LUMTURO**.



* Prelegoj okazas kutime en aŭditorioj 1K kaj 2K en la supra konstruaĵo n-ro 11 (Aula Magna). Foto: CHOE Taesok

1. **Ulrich Brandenburg** prelegas pri Esperanto kaj daŭripovo: spertoj de la 99-a Germana Esperanto-Kongreso.

2. **Duncan Charters**, prezidanto de UEA, gvidas kune kun Amri Wandel la programeron "UEA hodiaŭ: demandoj kaj respondoj", gvidas la seminarion "Instruado kaj lingvolernado", rakontas pri interkultura kompetento kaj prelegas, interalie, pri la temo "Kiel paroli publike pri Esperanto kaj kiel respondi al kritikoj pri Esperanto".

3. **Stefan MacGill** gvidas la Seminarion pri Aktivula Maturigo (mallonge AMO) kun la temo "Baltio en Eŭropa Kunteksto".

4. **Jozef Reinvart**, emerita diplomato de Slovakio, prelegas pri la temo "Ŝanco por nia movado malfermiĝi kaj krei kun neesperantista kompanio partneran kunlaboron".

5. **Nijolė Žambaitė**, litova ekonomikistino kaj diplomatino, prelegas pri "Mitoj pri diplomatio kaj diplomatoj."

6. **Bruĉjo Kasini** prelegas pri la projekto "30 oraj horoj"

7. **Ilona Koutny** prezentas kvin esperantologiajn prelegojn.

8. **Ryszard Rokicki** prelegas pri alternativa priskribo de Esperanta vortformado kaj prezentas sian libron "Enkonduko en la morfologion de Esperanto", kiun kuneldonis la ruslanda eldonejo Sezonoj kaj Litova Esperanto-Asocio kiel la 11an volumon en la libroserio Scio.

## Okazis

**Komuna organiza kunveno de BETanoj** en la ĉefa salono de la universitata konstruaĵo n-ro 6. Bonvolu legi pri la gravaj atentigoj en la dua numero de Lumturo.

*Se vi restas semajnon kaj veturadas per urba aŭtobuso, oni rekomendas aĉeti ĉe kiosko semajnan bileton (karton) kontraŭ 14 eŭroj. Se vi malmulte veturas, vi povas aĉeti ĉiufoje bileton ĉe ŝoforo konttraŭ unu eŭro. Ne forgesu ekvalidigi la karton aŭ bileton.*

## Koncerto de Edgaras Piščikas

La unuan tagon de BET-56, sabatvespere koncertis **Edgaras Piščikas**, membro de Sepa kaj Asorti en la ĉefa salono de la konstruaĵo Aŭlo (festoĉambrego en universitato).
Li prezentis per elektronika violono la muzikon, kiun li komponis. Laŭ lirika melodio, de agnulo al angulo, meandre fluis emociaj ĝojoj en silento, kiujn ni, esperantistoj ne povis ĉeeste ĝui pli ol du jarojn pro la kronvirusa pandemio.
La familia muzikgrupo Sepa kaj Asorti vekos nian senton kaj konsolos nian muzikan sopiron en sia koncerto lunde vespere en la sama loko.
Fotoj: Gražvydas Jurgelevičius





## Fotrakontoj




En la tuta historio de Baltiaj Esperanto-Tagoj unuafoje fizike ĉeestas la kuranta prezidanto de Universala Esperanto-Asocio, prof. Duncan Charters. Lin akceptas Povilas Jegorovas, prezidanto de Litova Esperanto-Asocio.
Foto: Gražvydas Jurgelevičius




La kutima BET-teamo de la akceptado en la unua tago
Foto: Gražvydas Jurgelevičius




Ekde la jaro 1959 estas la tradicio organizi Baltiajn Esperanto-Tagojn. Birute Rozenfelde (maldekstre) estas unu el la kunfondintoj de la aranĝo. Ŝi registriĝas ankaŭ por la ĉi-foja BET-56.
Foto: CHOE Taesok

## Novaj aliĝoj

252. Eugenija KEDIENĖ, Litovio
253. Raimonda GŽIMAILĖ, Litovio
254. Virginijus NUTAUTAS, Litovio

## Libroservo



Dum BET-56 la Libroservo funkcias de la 8a matene ĝis la 8a vespere ĉiutage. Vi havas la bonan ŝancon favorpreze akiri diversajn Esperanto-librojn. La Libroservo troviĝas en la unua etaĝo de la konstruaĵo n-ro 11. Foto: Gražvydas Jurgelevičius




Jen la leganto de LUMTURO! Foto: Gražvydas Jurgelevičius

**Saluton, karaj BET-anoj !**

Kiel kutime, ankaŭ dum **Baltiaj Esperanto-Tagoj 56** en Klaipėda aperos la ĉiutaga informilo, ĉi-foje kun la nomo ***Lumturo*** (la klarigo en la dua paĝo). En ĝi vi trovos aktualaĵojn, informojn, anoncojn pri salonoj de programeroj, eventualajn ŝanĝojn de la programo, precizigojn, priskribon de BET-56, fotojn, k.s.
Ĝia enhavo dependos ankaŭ de kontribuoj de BET-anoj mem, kiuj bonvolu raporti pri siaj impresoj, programeroj, ideoj, kursoj ktp, kaj poste aŭ metu siajn kontribuojn en tiucelan skatolon ĉe la akceptejo, aŭ sendu ilin rete (prefere) al: ***chojus@gmail.com***.
Ankaŭ fotoj en komputila formato estas bonvenaj, same kiel anekdotoj kaj rakontoj pri BET. Ĉiuokaze bonvenon al Klaipėda, kaj ĝuu la 56-an BET-on!

**CHOE Taesok, redaktoro**